



INFORMILIO

Numero 7/eo

Majo 2006

POR LERNI ESPERANTON

En la lastaj monatoj, akumuliĝis la iniciatoj por la ĉeesta lernado de Esperanto en diversaj hispanaj urboj, pluraj el kiuj estis organizitaj de anoj de nia asocio.

Tiel, en **Madrido** disvolviĝas nun diversaj kursoj en la librejo Muga de la kvartalo Vallecas. Dum la lasta kvaronjaro de 2005 okazis la unua elementa kurso. La kursfino estis celebrita la 17-an de decembro, kaj profitante tiun cirkonstancon SATeH organizis ekspozicion kaj vendon de esperanta materialo, kiu vekis grandan atenton inter lernantoj. Poste ni kunvenis por kunmanĝi en proksima restoracio, kun la intenco havigi al la lernantoj la eblecon konstanti la realan tuttagan uzon de la lingvo. Dum la komenco de ĉi tiu 2006 ekis nova elementa kurso, sabate el 17h00 ĝis 18h30, dum la malnovaj lernantoj aliĝis al perfektiga kurso (sabate el 18h30 ĝis 19h30). Ĉar la kursoj plu daŭros, la interesitaj povas kontakti rekte la Librejon Muga (Avda. Pablo Neruda, 89, tfno: 91.507.90.84/85) aŭ rekte skribi al SATeH.

Ankaŭ en **Andaluzio** organiĝis pluraj kursoj en diversaj urboj. Jen ekzemple:

- EN RONDA (Malago). Instruita en la *Casa de la Juventud* (Junuldomo). Ĉiujn mardojn kaj ĵaŭdojn el 17h00 ĝis 18h30.
- EN ONUBO. Du kursoj: en la Gimnazio Rábida (Av. Manuel de Siurot, 9), ĉiujĵaŭde je la 19h30, kaj en la Publika Biblioteko (Gran Vía), ĉiusabate el 11h00 ĝis 12h30.
- EN SEVILO. Instruita en la Municipa Civita Centro (*Casa de las Sirenas*). Ĉiujĵaŭde el 19h45 ĝis 21h30.
- EN MALAGO. Instruitaj en la Centro de Instruado por Plenkreskuloj Al-Andalus kaj en la sidejo de la sindikato CGT
- EN HĀENO. Instruita en la Universidad Popular (*Popola Universitato*). Sesmonata kurso, tri horojn semajne.

Por plia informado vi povas skribi al: jaen@esperanto-andalucia.org, aŭ vizitu la retpaĝon de Andaluza Esperanto-Asocio.

Al la propono de kursoj de Esperanto en la **Universitatoj** de Bilbao (UPV), Barcelono (*Universidad Autónoma*) kaj La Laguna, ĉijare aldoniĝas nova kurso en Oviedo. Promociita de la Astura Esperanto-Asocio, la unua eldono finiĝos dum tiu ĉi monato majo. Por plia informado oni povas kontroli la retpaĝaron de la Universitato de Oviedo.

Kaj en Katalunio, membroj de la sindikato CNT de **Mataró** plu organizas novajn kursojn en la sidejo de sia organizo.

POLITIKAJ AKTIVADOJ

En la Festo del Komunista Partio de Hispanio (septembro 2005)



» *La he rooj kom parataj kun la krimuloj.* Kiu tiu ĉi titolo, SATeH publikigis la tradukon de la teksto verkita de la konata greka muzikisto Mikis Theodorakis, rilate al la kontraŭkomunista memorandumo de la Eŭropa Konsilio, kiu devus esti aprobita en januaro 2006. “La Konsilio de Eŭropo decidis ŝanĝi la historion. Tiu volas distordi ĝin, konfuzigante la agresantojn kun iliaj viktimoj, la heroojn kun la krimuloj, la liberigintojn kun la konkerintoj, la komunistojn kun la nazioj”, oni povis legi en tiu teksto. Se vi deziras ĝin kompletan, skribu al ni.

En la festmitingo de la CNT en Madrido (aprilo 2006)



» En la kadro de la kunmemoraj tagoj de la gvina datreveno de la fondo de la Liberecana Ateneo de Benissa, okazintaj de la 2a ĝis la 4a de decimbro de 2005, disvolviĝis prelego pri *Anarkiismo kaj Esperanto*. Bazita sur la teksto samtitola kiun nia asocio publikigis kiel *Dokumento-02*. La teksto estis poste republikigita en pluraj diversaj paĝoj de la Reto. Se vi ĝin ne ricevis en la papera versio, vi povas peti ĝin de ni.

PORPACA AGADO

Por kunmemori la Internacian Virinan Tagon de 2006, 23 virinaj organizoj de la provinco kaj la urbo **Hiroŝimo** sendis mesaĝon al ĉiuj landoj, pere de la esperantistaro tutmonda. La kunliga Komitato petis la sendon de mesaĝoj apogantaj la artikolojn 9an kaj 24an de la japana Konstitucio, kiuj pritraktas, respektive, la rifuzon al la uzo de la milito en eksteraj aferoj, kaj la egalecon de viroj kaj inoj. La teksto de la alvoko estis tradukita de nia asocio, kaj publikigita en nia retpaĝaro, kaj ni ankaŭ kunordigis la sendon de mesaĝoj al la organizantoj.

Oni ricevis mesaĝojn el 35 landoj. La organiza Komitato montris, en kunveno organizita la 4an de marto en la Atombomba Muzeo de Hiroŝimo, sian dankon al la esperantistoj, kaj sian esperon ke tiu internacia apogo helpu kontraŭi la kampanjon de diversaj politikaj organizoj en Japanio favoraj al la modifo de la japana Konstitucio en pli agresan kaj konservativan direkton. Dum la kunveno oni menciis Esperanton plurfoje, kaj la ĉeestantoj, 450 aktivuloj el 23 virinaj organizoj, ricevis broŝuron de la mesaĝoj presitaj.

La agado havis kuriozan flankan efikon: ĝi favoris rekordan vitizadon al niaj retpaĝoj dum la Internacia Tago, pere de serĉiloj el granda parto de la hispanamerikaj landoj, fare de retemuloj serĉantaj “mesaĝojn por la Internacia Virina Tago” aŭ simile.

RENASKIGI ESPERON EN BALKANIO

La okazigo, du jarojn sinsekve en Balkanio, de kongresoj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), en Zagrebo en pasinta jaro 2005, en Beogrado en tiu ĉi 2006, rememorigas tragedion flankenmetita el la aktualaĵoj kaj estis la celo de artikolo de Henri Masson revekante la etoson de la lastaj kongresoj en la eksa Jugoslavio.

En 1991, la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH) invitis SAT okazigi sian kongreson de 1993 en Sarajevo. Unu jaron poste, sur la kovrilpaĝo de “Sennaciulo”, la organo de SAT, troviĝis alvoko de la ELBiH en kiu la esperantistoj estis invititaj agi por ĉesigi la militon kaj la kontraŭpopolajn perfortaĵojn.

Socikultura asocio, SAT jam havis kongresojn en Beogrado (1956), Novi Sad (1969) kaj Rijeka (1980), kaj tiu ĉi povintus esti alia rimedo por pli bone disvastigi tiun mesaĝon tra la mondo. Precize en Sarajevo mem, per grandaj manifestacioj, la loĝantaro forĵetis kaj kondamnis plej energie la instigon al interetna malamo.

Publikigitaj en “Sennaciulo”, informoj de membroj de SAT en la landoj de eks-Jugoslavio jam havigis klarigojn pri la minacoj, kiujn estigis naciismo kaj etnismo en eksceso en Balkanio.

“Sennaciulo” de majo 1993 enhavis longan artikolon pri Sarajevo kun subskribo de Senad Ĉolić, esperantista loĝanto: “... Efektive, oficejo de la E-Ligo de BkH kaj ĝiaj materiaj kaj homaj potencialoj estis dum kvin, ege malfacilaj kaj gravaj monatoj, en funkcio de batalo por homeco, centro de intelekta rezisto sur plano de homaj rajtoj orientita al la gvidaj interŝtataj institucioj kaj la monda publiko, la centro kiun vizitadis dekoj da kunlaborantoj, publikagantoj kaj ĵurnalistoj.” Bedaŭrinde, pereis esperantistoj. La lokaloj estis plejparte detruitaj kun ilia enhavo. Dum la sieĝo, en 1994-1995, Radio Sarajevo uzis ankaŭ Esperanton por diskonigi informojn kiuj poste aperis en la libro “Spite al ĉio Bosnio” eldonita en Sarajevo fare de ELBiH kun subteno de Kataluna Esperanto-Asocio.

Malgraŭ la ekstreme malfacilaj cirkonstancoj, la esperantistoj daŭrigis la agadon same en Serbio kiel en Kroatio, en Slovenio, en Bosnio kaj Hercegovino kaj en Albanio per partopreno en pedagogiaj agadoj (projekto de interkultura agado “Interkulturo”), al la redaktado kaj eldono de studverkoj, de vortaroj, de literaturaj verkoj.

Tereza Kapista, membro de la Organiza Kongres-Komitato de Beogrado, instruis Esperanton en tendaroj de afganaj rifuĝintoj kaj, pli freŝdate, en Burundio.

SALONO DE LA PAC-INICIATOJ DE PARIZO

Nia franclingva fratasocio SAT-Amikaro estas unu el la 150 asocioj kiuj partoprenos en la 2a Salono de la Paciniciatoj, okazonta en Parizo de la 2a ĝis la 4a de junio 2006. Ĝin organizas, sub patronado de Unesko, la “Franca kunordigado por la internacia jardeko de la disvastigo de kulturo de la neperforto kaj de la paco”. Vi povas kunlabori en ĝia disvolviĝo, per la sendo al ili (aŭ, plibone, nerekte al ni) de fotoj pri E-grupoj aŭ E-kursanoj el la tuta mondo kun mallonga pledo, slogano, frapfrazo, esprimdeziro por kaj pri paco, por lingva demokratio kiel fundamento de justaj kaj pacaj rilatoj, ktp. Ekzemple, SAT-Amikaro kreis afiŝeton en formato A4 pri Esperanto-kurso en la universitato de Babolsar, apud Kaspio, en Irano, per foto ricevita kun la slogano “Ni ŝatas Esperanton ĉar Esperanto estas lingvo de PACO”, kiun vi povas ricevi elektronike en formato pdf nur tion petante al ni.

ALIAJ INICIATOJ

HISPANLINGVIO

De la kreo de nia asocio, nia celo estis ĉiam la laborado en ĉiuj lokoj kie la hispana lingvo estas parolata, sendepende de landlimoj aŭ naciaj konsideroj, konforme al la karaktero de la Laboristaj Esperanto-Asocioj agantaj en la sfero de SAT. La mencio al Hispanio estis ĉiam nur praktika, pro leĝaj kialoj kaj ankaŭ pro respekto al la reala situacio de niaj fortoj. Ĝis nun tiu celo montriĝis malfacile plenumbla, ĉefe pro la malfacila stato de la Esperanto-movado en la hispanlingva Latinameriko.

Feliĉe, tiu situacio nun ekŝanĝiĝas. Alvenis petoj de informado, kaj proponoj de kunlaboro el centraj kaj sudamerikaj landoj. La progreso ne estas rapida, sed la kunlaboro ja estas ebla.

Ni ankaŭ havas anojn kaj kunlaborantojn en aliaj landoj. Kelkaj eĉ ne scipovas la hispanan.

Ni esperas baldaŭ informi pri novaj iniciatoj en tiu tereno. Sed dume, sciui ke nia celo estas favori la agadon por Esperanto kaj por SAT en ĉiuj lokoj, kaj ke ni esperas iam fariĝi vera **SAT-en-Hispanlingvio**.





Presentación del libro:
“El Hombre que desafió a Babel”
de R. Centassi y H. Masson

Miércoles 10 de Mayo
19.30 horas

Librería MUGA
Avenida Pablo Heredia 89
Vallecas
91-5079084



Concursos para debatir sobre esta biografía del padre del idioma esperanto con
ALEJANDRO PAREJA, traductor de la obra.
Además, tendremos en el local una muestra significativa de publicaciones en esperanto.

Organiza:  Librería MUGA Colabora:  Madrid Esperanto-Liceo  Club de Esperanto de Vallecas  Izquierda y Esperanto, SATEH

Danke al la peno de diversaj membroj de Madrida Esperanto-Liceo estis ebla la publikigado de traduko al la hispana de la biografio de Ludoviko Lazaro Zamenhof, verkita de Henri Masson kaj René Centassi, trovebla ĝis antaŭnelonge en versioj franca kaj esperanta, kaj jam tradukita al aliaj lingvoj. La hispana libro titoliĝas “*El hombre que desafió a Babel*” kaj ĝin eldonis Gram Ediciones.

La libro prezentiĝis en la Librejo Muga de la madrida kvartalo Vallecas la 10an de majo, kaj estas havebla ankaŭ en nia **Libroservo**:

<http://www.nodo50.org/esperanto/libroservo.htm>

Por kontakti kun ni:

SAT-en-Hispanio (SATEH)

Poŝtkesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid

sateh@nodo50.org

<http://www.nodo50.org/esperanto>